


# starto★

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

1971

7



Honoran medalon de BEA transdonas al la prezidanto de AE SSR Pavel R o s a delegito de la bulgaraj esperantistoj s - ano Parvanov ĉe la ĉeĥa-slovaka renkontiĝo en Vsetín ( legu sur la 3-a paĝo ).

## KUNSIDIS LA KOMITATO DE ĈEA

La 9an kaj 10an de oktobro okazis en Prago la 6-a plenkunsido de CK ĈEA. Raporton pri la agado dum la pasinta periodo prezentis la asocia prezidanto J. Vitek. Pri la mastruma flanko de la organiza aktiveco, budĝeto kaj provizora agadplano raportis la sekretario P. Polnický. D. Kočvara informis la ĉeestantojn pri la kunveno de ĈSEF en Vsetín.

Estis aprobitaj statutoj de jenaj sekcioj de ĈEA : junulara, pedagogia, fervojista, teknikista kaj medicinista.

Plue estis aprobita okaziĝo de la II-a Kongreso de ĈEA en Ostrava (6.-8.5.1972). J. Vitek estis elektita kiel reprezentanto de ĈEA por la 57-a UK en Portlando.

La plenkunsido rekomendis en aparta alvoko al ĉiuj esperantistoj unuece kaj aktive partopreni la ĝeneralajn balotojn kaj subteni kandidatojn de Nacia Fronto.

### KEIKAJ PENSOJ EL LA RAPORTO DE LA ASOCIA PREZIDANTO

Sekvante la agadon de unuopaj rondetoj kaj grupoj ni nepre devas konstati, ke unuj laboras celkonscie laŭ bone preparitaj programoj, dum la aliaj - bedaŭrinde sufiĉe multaj - senspirite kaj sencele. Tial ankaŭ la kunlaboro iliaflanke estas sendisciplina, sensistema. Ni ĉiuj faru nian eblon por modele ekfunkciigi ĉiujn grupojn.

La membro-varbado nur ŝajne estas kontentiga. Fakto urĝe plenumenda estas, ke ĉiu membro de la grupo estu nepre ano de nia asocio. Nur plurmilmembra organizaĵo havas siajn gravecon kaj potencon kaj estos adekvate traktata ankaŭ de niaj aŭtoritatoj.

Ni daŭre klopodu enpenetri la presagentejon ĈTK kaj ĉiujn ceterajn komunikilojn. Tial ankaŭ niaj "presaktualaĵoj" devas esti vere aktualaj kaj altiraj. Tiurilate la klubo en Brno agas ekzemplodone.

La asocia organo STARTO kontentige ŝanĝas sian aspekton kaj ni povos plenumi nian planon por la kuranta jaro, ĉar la membraro ricevos siajn ok numerojn promesitajn.

De semajno al semajno laboroj kaj taskoj de la asocia sekretario kreskas kaj estas jam urĝa tempo, kiam la komitatanoj nepre helpu solvi la taskojn individuaj tiel, ke nia E-publiko estu kontenta. Ĝis nun ni sukcesas nur parte en tiu ĉi agadsfero. Ofte la komitatanoj mem kritikis la laboron, sed siajn proprajn devojn ili forgesas...

Nuna asocia proprajo, kompletigita migranta ekspozicio "Esperanto kaj la laborista movado estas je plena dispono al niaj grupoj same kiel la E-filmo pri Sovetunio.

Jam nun ni koncentru niajn fortojn por la venontjara II-a kongreso de nia asocio en Ostrava, kiu post trijara agado estos loko, kie ni rerigardos niajn sukcesojn kaj mankojn, kaj kune kun nia membraro planos la estontecon de nia movado.

Koncerne fakan aktivecon eblas diri, ke niaj sekcioj montras kontentigajn rezultojn. Laŭ mia opinio ĉefe la porpaca sekcio devas ekhavi firman fundamenton kaj laborkampon. Ni ĉiuj klopodu pri tio. La gazeto PACO trovu vastan reton de abonantoj. Mi substreku ankaŭ labor-rezultojn de la pedagogia sekcio, kiu konscie sekvas sian planon - garantii al nia movado provizon da kvalifikitaj instruistoj, kvalitaj instrumaterialoj ktp. Ni esperu ankaŭ, ke Stata Pedagogia Eldonejo klopodos baldaŭ aperigi la lernolibron de J. Cink.

Someraj tendaroj, kompare kun la alilandaj, bone zorgas pri nia estonta generacio. Speciale tiu en Lančov, kiu venontjare festos sian dudekjariĝon, laboras tre efike, ofte en vere malfavoraj kondiĉoj. La entuziasmo kaj tutjara laboro de libervoluloj estas admirinda.

Specialan atenton meritas niaj kontaktoj kaj kunlaboro kun la slovaka esperantistaro. La lasta plurhora federacia laborkunveno en Vsetín plene dokument-

(Daurigo sur la 5a pg.)

## FESTO DE LA ĈEĤA - SLOVAKA RECIPROKĈO

La historiistoj de la ĉeĥa Esperanto-movado trovas ĝian originon en Valaĥio, la orientmoravia landparto. Jam antaŭ 1900 aktivis tie la unuaj pioniroj, kiel T. Ĉejka, kies lernolibro elvokis la movadon inter la ĉeĥoj. Post la dua mondmilito estis fondita ER en Vsetín, kiu, sub la gvido de Aleš Berka aranĝis kelkajn regionajn renkontiĝojn. En la fino de septembro ĉijara ariĝis en tiu ĉi urbo pli ol tricent esperantistoj el la tuta ĈSSR por partopreni Renkontiĝon de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj /24.-27.9./

La salono de la Uzina Klubo "Sklář" (Vitrisko) ŝajnis esti preskaŭ malgranda, kiam ili kunvenis por la solena malfermo. Venis ankaŭ gastoj el GDR, Bulgario, Aŭstrio, Hungario, Kanado kaj Italio, entute dekok eksterlandanoj kaj kvardek du amikoj el Slovakio. Onian atenton altiris la ruĝa silka standardo maldekstre ĉe la podio kaj du florumoj fabrikitaj el usonaj obusingoj - donacoj de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio al ĈEA. Sur la standardo vidigas la surskribo brodita per orflavaĵ literoj: VIVU LA VJETNAMA - ĈEĤOSLOVAKA AMIKECO.

La prezidanto de ĈEA Josef Vítek skizas la panoramon de la movado en la ĉeĥaj landoj. Liaj vortoj sonas admone, kiam li demandas: Ĉu en ĈSR ekzistas nur tiuj 2 560 esperantistoj, kiuj hodiaŭ membrigis al la asocio? Ĉu la ceteraj 250 nepagintaj siaj membrecon jam mortis aŭ ĉesis aktivi? Kiamaniere konvinki niajn ŝtatajn aŭtoritatojn pri la utileco de Esperanto? Ni klopodu do reveki ĉiujn dormantojn - prosperanta asocio estu nia celo! Li alvokas ĉiujn esperantistojn fariĝi abonantoj de la gazeto PACO pro la grandaj eldoneblecoj, kiuj ĝi disponigas al ni. La parolanto plue substrekas, ke neniam estis kunvivado de ĉeĥoj kaj slovakoj tiel forta kaj sincera kiel nun. Ni alte taksas ĉiujn sukcesojn de niaj fratoj en Slovakio.

Viaj sukcesoj estas ankaŭ la niaj, respondas al li la prezidanto de AĈSSR Pavel Rosa. Nia movado estas integra parto de la tuta movado en Ĉeĥoslovakio. La slovakaj esperantistoj sukcese penetris politikajn kaj kulturajn instituciojn, kies reprezentantoj rekonis grandan valoron de la Internacia lingvo.

Ni estu ĉiam laboremaj, agadpretaj, oferemaj... kapablaj kvalite servi; ni perfektigadu nin ne nur koncerne la lingvon mem.

P. Rosa informis pri la solenaĵoj omaĝe al la 100jara jubileo de la elstara slovakaj revoluciulo kaj poeto Janko Král, en kiuj partoprenos ankaŭ la slovakaj esperantistoj. Li invitis ĉiujn ĉeesti la slovakon kongreson, kiu okazos venontjare en aprilo antaŭ la ĉeĥa.

Sekvis transdono de honormedaloj okaze de la 60-a datreveno de la fondiĝo de BEA. Inter deko da honorigitoj estas la konataj nomoj de meritplenaj laborantoj: Tomáš Balda, Aleš Berka, Ludevít Izák, Theodor Kilian, Jiří Kořínek, Anna Pišíková, Pavel Rosa, Eduard V. Tvarožek, Arnošt Váňa, Josef Vítek.

### Oratoroj kaj deklamantoj konkursis

Plezuriga estis kontribuo al la kultura parto de la programo. Dum el inter 5 partoprenintoj en la konkurso oratora la viroj gajnis la unuajn tri premiojn, la recita kun 12 partoprenintoj pruvis, ke tiun ĉi arton pli bone mastris la inoj; ili batalakiris por si la du ĉefajn poziciojn kaj partoprenis eĉ la trian kune kun unu vira aspiranto. Ing. Jaroslav Adamec el Třinec venkis per sia prelego "Rilato de la junularo al Esperanto ĉe ni" (ni represas ĝin aliloke) kaj Katka Jedličková el Opava profitis plej multajn poentojn pro la brila prezento de la poemo "Promesoj de kandidato" de R. Schwarz. La ĵurio konsistanta el D. Kočvara, J. Kořínek (prezidanto), J. Mařík, E. V. Tvarožek, A. Váňa kaj J. Vondroušek aljuĝis la 2-an premion en la oratora parto al ing. Vladimír Němec, kiu parolis je temo analoga al tiu de ing. Adamec kaj la 3-an premion al Jan Tichon ("Esperanto kaj la paco"); en la recita parto la 2a premio venis al Zuzana Bednářiková ("La morto de Jánošík" de Ján Botto) kaj la trian dividis inter si Anna

Bulejová ("Maryčka Magdon" de P. Bezruč) kaj Karel Vysloužil (la samo).

Sabaton vespere aperis sur la estrado virina kanthoro el Vsetín, laureato de Statpremio, kiu sub la gvido de Květa Duřpeková prezentis kelkajn muzikerojn, kies tekstojn tradukis plejparte s-ro Jiří Kořínek. La vespero kulminis per prezentado de la internacie konata folkloro grupo "Jasenka".


La distran programon dumtage helpis variigi lumbildoj de s-ano V. Sládeček el Ostrava pri la 56-a UK en Londono kun sukcesa sonakompano kaj prelego de s-ano George du Temple el Kanado, kiu rakontis pri sia patrolando.

Ankaŭ en la fakoj

aktivis la ĉeestantoj. Okazis entute ok fakaj kunsidoj: teknikista, medicinista, fervojista (la raporton legu en la respektiva rubriko), instruista, IKUE + KELI, federacia komitato, komitatoj de SET Lančov kaj de Herbortice. La medicinista sekcio ekzemple planas vastigi internaciajn kontaktojn precipe kun Sovetunio kaj i.a. organizi ekskursojn eksterlanden. Nove fondiĝis Informaj sekcioj de ĈEA kaj AE SSR sub la gvido de la redaktoroj de STARTO (O. Kníchal) kaj ESPERANTISTO SLOVAKA (d-ro L. Izák).

Tra Valaĥio

veturis la lastan renkontiĝan tagon du aŭtobusoj kun cent-kelkaj geesperantistoj. Mirinda pejzaĝo kaj favora vetero kompletigis agrablan impreson pri la renkontiĝo. Kun plaĉa libreto pri la regiono porokaze eldonita de ER Vsetín en Esperanto oni trapasis Velké Karlovice, Pustevny kaj Rožnov, la pitoreskan urbeton sub la piedo de la monto Radhošť - kun ĝia muzeo en natura. Adiaŭante ĉi tiujn lokojn, oni preskaŭ unuanime konstatis, ke la renkontiĝo - ĉefe dank' al la respektinda klopodo de la organizantoj en Vsetín - iĝis digna festo de la reciprokeco ĉeĥa - slovakaj. O. Kníchal



En la novembroj ĝeneralaj balotoj en Ĉeĥoslovakio partoprenos kiel kandidatoj de Nacia Fronto ankaŭ membroj de ĈEA. Unu el ili estas d-ro Karel Máca, prezidento de la E-rondeto kaj la ĉefkuracisto de la hospitalo en Bor apud Tachov /okc. Bohemio/. K. Máca aktivis ankaŭ kiel membro de Ĉeĥa Packonsilantaro.

Je la propono de ER oni registris lin kiel reprezentanton de unu el la plej aktivaj organizaĵoj de la urbo. En la tiea Nacia Komitato li reprezentos ankoraŭ la lokajn filiojn de la du pli grandaj organizaĵoj - Ĉs. Ruĝa Kruco kaj Ligo por la Kunlaboro kun Armeo.

Dirite per la vortoj de nia kandidato la kunlaboro de ER kun la Distrikta Packonsilantaro -

## Unu el niaj kandidatoj

kies vicprezidanto d-ro Máca estas - evidentigas, ke la porpaca agado de la esperantistoj en Bor alportas utilon ne nur al la urbo mem, sed al la tuta distrikto. /kn/

## Samideana kroniko

Alois Z m e š k a l, komitatano de EK en Praha kaj ĝia bibliotekisto atingis la 12an de nov. sian 55an naskiĝtagon. • Adolf N o z a r, lerneja inspektoro en Poděbrady festis 17.10 sian 80jarigon. • D-ro J. Š t o ĉ e k el Poděbrady la aĝon de 60 jaroj. Sinceran gratulon al ĉiuj!

Růžena K a p l e r o v á, honora membrino kaj bibliotekistino de EK Brno forpasis 81jara la 24an de sept. • Josef B u r s a, EK Praha, mortis 16. 9. en la aĝo de 71 jaroj. • Š. D u l o v i ĉ forpasis 63jara en Košice. Honoron al ilia memoro!

Antaŭ 80 jaroj (2.11.1891) naskiĝis O. S k l e n ĉ k a (mortinta en 1962) • La 6an de dec. atingus sian 70an jaron Jaroslav Š u s t r, hon. m. de ĈEA.

## RENKONTIĜO EN MĚLNÍK Sub la signo de amikeco kun GDR

La 17an de oktobro kolektiĝis en la historia kastelo de Mělník ĉ.280 esperantistoj por partopreni la jam 5-an renkontiĝon ĉe la kunflua punkto de Vultavo- kaj Elbo-riveroj. Venis ankaŭ estraranoj de ĈEA kaj aŭtobusa karavano el Prago. Ĝojigan etoson al la aranĝo donis grandparta ĉeesto de junularo. La organizanto -ER ĉe "ZDŠ" /fundamenta lernejo/ en Mělník - invitis okaze de la ĵus okazantaj **KULTURTAGOJ DE GDR EN ĈSSR** grupon de esperantistoj el Dresdeno kun dekmembra akordeona orkestro. Partoprenis ankaŭ du gastoj el Hungario.

Krom la kutima turisma kaj societa programoj prezentiĝis en la urba Domo de Kulturo la dresdenaj akordeonistoj sub la arta gvido de s-ano Rolf D e k e, portanto de la nacia artpremio de GDR, en duhora koncerto de komponaĵoj el la germana muziko. La programon, kiun vizitis krome reprezentantoj de la lokaj kulturaj kaj lernejoj - solene enkondukis kaj lerte anoncadis Josef Vítek.

La tutan aranĝon oni povas aprezi kiel modelan kontribuon de esperantistoj al interŝanĝo de kulturaj valoroj inter la du najbaraj amikaj landoj. /Logo/

### SOLIDARE KUN VJETNAMIO

La porpaca sekcio de ĈEA lanĉis kampanjon helpe al la batalanta Vjetnamio - okaze de la 15a fondo-datreveno de VPEA. Ĝi okazas sub la aŭspicio de ĈEA

La sekcio alvokas la E-rondetojn kaj klubojn aranĝi dum novembro 1971 - februaro 1972 kunlabore kun la uzinaj kluboj aŭ aliaj organizaĵoj **VESPEROJN DE SOLIDARECO DE ĈS.ESPERANTISTOJ KUN LA VJETNAMA, LAOSA KAJ KMERA POPOLOJ**. La precipa celo estas gajni materiajn rimedojn por havigi necesajn objektojn de

ĉiutaga uzo por niaj amikoj en Vjetnamio (Hindoĉinio). La donacoj estos transdonitaj al la ambasado de VDR en Prago fine de la venonta februaro en la kadro de la "Semajno de Internacia Amikeco" organizata ĉiujare de UEA.

La kampanjon oni intencas utiligi samtempe por la popularigo de la noblaj ideoj kaj celoj de la E-movado, montri ties humanisman kaj politike gravan aspekton.

Estimataj amikoj, informojn pri viaj arandoj sendu gustateme al ĈEA !

### KUNSIDIS LA KOMITATO DE ĈEA (daŭrigo de la 2-a paĝo)

is, ke ili estas tre bonaj. Ni akcentas precipe modelan pensharmonion.

Mi ne konsideras kontentigaj niajn kontaktojn kun politikaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj. En tiu ĉi sfero ni devas ankoraŭ multon fari. Same ni devas plibonigi niajn kontaktojn kaj kunlaboron kun la asocioj de socialismaj landoj.

Evidentiĝas do, ke nia asocio devas fordoni ankaŭ al la ŝtato kvalitan laboron, ĉu politikan aŭ alispecan, kaj tiam ni ankaŭ povos deziri ĉiuflankan subtenon, sen kiu ni sole vivetus. La unua nia komuna devo estu montri nian politikan maturecon okaze de la tutŝtataj balotoj. Mi ĝojas, ke sufiĉe multaj membroj ne sole kunlaboras en la elekta kampanjo en siaj respektivaj loĝlokoj, sed ke ni havas eĉ kandidatojn el niaj vicoj...

**VENONTJARE PLENUMIĜOS 70 JAROJ de ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA.** Ĉiu ĉeĥa esperantisto devus kontribui al tiu ĉi grava jubileo. Jam nun oni povas helpi, sendante al EKP diversajn dokumentojn-librojn, gazetojn, artikolojn, korespondaĵojn, surbaze de kiuj oni povu starigi dignan dokumenton libroforme pri la historio de la Esperantomovado en nia ĉefurbo.

## PROKLAMO DE CK ĈEA OKAZE DE LA ĜENERALAJ ELEKTOJ EN ĈSSR

Ĉeĥaj esperantistoj per sia ĉiutaga agado klopodas pruvi utilecon de la internacia lingvo, uzante ĝin kiel efikan ilon por informi eksterlandon pri la sukcesoj de socialisma konstruado.

La membraro de la E-rondetoj en ĈSR partoprenas ĉiuj aktivecojn lige kun la procezo de la politika konsolidigo en Ĉeĥoslovakio, konscie alpaŝante ankaŭ la ĝeneralajn elektojn. Funkciuloj de la asociaj organoj, sekcioj kaj la estraroj de ER, samkiel unuopuloj, aktive partoprenas en la balota kampanjo kiel membroj de la respektivaj komisionoj kaj fine eĉ kiel kandidatoj de la reprezentaj organoj de Nacia Fronto.

Ĉeĥaj esperantistoj klopodos plenumi sian patriotisman devon kaj helpos laŭ siaj eblecoj kaj fortoj al la sukcesigo de la balotoj.

### DATREVENO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ

En 1911, antaŭ 60 jaroj, estis fondita de F. J. Chaloupecký, redaktoro de PRAVO LIDU, LABORISTA UNUIĜO ESPERANTISTA kiel fako de la socialdemokrata kleriga asocio "Laborista Akademio". En 1912 Chaloupecký komencis eldoni propagandan gazeton "La Kulturo", kiu aperadis ĝis la jaro 1914. Ĝi turnis sin senkaŝe al la laboristoj konsciataj pri sia aparteno al la batalanta klaso, trovante rimarkindan resonon.

La tradicion de Laborista Unuiĝo Esperantista daŭrigis post la 1-a mondmilito novefondita "Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio" (1920) kun sidejo en Plzeň kaj "Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio Esperantista" (1932) kun sidejo en Ústí n. L. La lasta memvole disigis en 1947 "por helpi al plifortigo de la nuna unueca organizaĵo esperantista", t. e. de EAĈSR.

## Recenzoj

Lesja U k r a i n k a : LIRIKO. Okaze de la 100jara jubileo (1871) de la naskigo de la granda ukraina poeto, la Komisiono pri internaciaj ligoj de Ukrainaj Esperantistoj en Kievo eldonis 86-paĝan elekton el sia verkaro kun la antaŭparolo de la verkisto Oles Honĉar. Inter la tradukintoj plejofte ripetigas la nomoj de K. Gusev, A. Logvin kaj N. Andrianova, reprezentantino de la Esperanto komisiono, kiu antaŭnelonge restadis en Ĉeĥoslovakio kaj kiu estas la kompilinto de tiu ĉi atentinda verketo.

Vo Nguyen Giap : NEFORGESEBLAJ TAGOJ.

Eldonis Fremdlingva Eldonejo en Hanojo, 1971, 193 paĝoj. La aŭtoro, unu el la ĉefaj figuroj de la insurekcio kontraŭ la francaj koloniistoj en Vjetnamio inter la 1945 kaj 1946-a jaroj, rakontas pri la eventoj de tiu signifoplena periodo. La libro estas nepre akirinda por ĉiu, kiu volas havi bazajn dokumentojn pri la nuntempa Vjetnamio. Havebla ĉe ĈEA, prezo 5 Kčs.

### "PERLO" DE DANUBO INVITAS

Inter la 17-a kaj 23-a de julio 1972 okazos en Budapeŝto HUNGARA KULTUR - FESTIVALO sub aŭspicio de UEA. La organizantoj volas tiamaniere doni al la esperantistoj el Eŭropo - el inter kiu ne multaj povos partopreni la Universalan Kongreson en Portlando - eblecon renkontiĝi en konvena kadro; en la programo de la festivalo oni prezentos rimarkindajn verkojn de la klasika kaj moderna hungara literaturo kaj arto, organizos viziton al la urbo, ekspoziciojn kaj ekskursojn.

Aliĝkotiĝo 240 forintoj. Pli detala informo: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 5, p. f. 193.

ESPERANTISTA RENKONTIĜO en kadre de Foiro en Lejpcigo (GDR) okazos la 11-an de marto 1972 en Klubo de la Intelligentularo "Gottfried-Wilhelm-Leibnitz", 701 Leipzig, Elsterstr. 35, je la 19,30-a horo.

ĈION KONCERNE STARTON AŬ TIES RED. BV. DIREKTI AL ĈEA, PRAHA 2, p. k. 8, ĈSR. LA KONTRIBUAĴOJN SKRIBU KLARE KAJ LAŭBLE EN LA INTERNACIA LINGVO.

## Nova ŝanco por la ĉeĥa junulara movado

En Choltice apud Pardubice konferencis de la 1-a ĝis la 3-a de oktobro Junulara sekcio de ĈEA. Sufiĉe komforta kastelo servis kiel konferencejo kaj loĝejo por tridek gejunuloj el 14 bohemiaj kaj moraviaj urboj.

La ĉefa punkto de la traktado estis voĉdonado pri la nova komitato de JS. Elektitaj estis: prezidanto Karel Hromádka /Pardubice/, vicprezidantoj Josef Vítek jn. kaj Gustav Heczko, sekretariino Jindra Řeháková, kassistino Sylva Polnická, membroj Jiří Bohun, Zdeněk Heiser, Olga Sittauerová kaj Vladimír Škoda, revizorinoj Leonarda Rýznarová kaj Marcela Vlasáková. La novelektita komitato okazigis sian unuan kunvenon. Dimanĉe ĝi proponis sian alvokon kaj agadprogramon por la venonta periodo, kiuj estis aprobitaj.

En la libera tempo oni rigardis riĉajn eksponaĵojn de la loka muzeo kaj admiris belecon de la baroka kastela kapelo. Iom da tempo restis ankaŭ por sportemuloj, kiuj ludis volejbalon. Muzik-grupo el Pardubice preparis koncerton de moderna muziko kun kantoj en Esperanto.

La konferenco estis bone organizita kaj ĝiaj traktadoj viglaj-supozeble eĉ fruktodonaj. Bedaŭrinde nur, ke ne ĉiuj lokaj grupoj kaj rondetoj, kie gejunuloj troviĝas, estis reprezentitaj. Adreso de JS ĈEA: Mělník, p.k.25, ĈSR. /pký/

## Rondeta vivo

**PÍSEK** - La lokaj esperantistoj pasigis sian ĉi-jaran libertempon denove en la entreprenja kabano de la uzino Jitex, en Churánov. Du semajnojn restadis tie ankaŭ gastoj el Pollando, Jugoslavio, Hungario, GDR kaj Anglio.

**PŘÍBRAM** - EK aranĝis en la lasta oktobra semajno ekspozicion en Pražská ul. pri laborista movado esperantista.

**ŠUMPERK** - Regulaj kunvenoj rekomencigis la 5an de oktobro. En novembro oni ekinstruos E-on en la kursoj por komencantoj, progresintoj kaj infanoj.

Kiu el E-amikoj vizitos la kastelon en Velké Losiny, trovos tie arbon kun E-surskribo plantitan ĉe la kastela ĉefpordego antaŭ 4 jaroj.

**TŘEBÍČ** - La klubo vigle laboras sub la gvido de prof. Jan Jičínský kaj vicprezidantoj František Pisk kaj Pavel Sittauer, kiu estis proponita lastatempe kiel kandidato de NF. La administrantoj de SET Lančov estas L. Bala kaj Boh. Dvořák.

Okazas tri kursoj - por komencantoj, instruistoj (gvidas P. Sittauer) kaj konversacia. Varia estas programo de la klubaj vesperoj. La pasintan monaton EK partoprenis en la tago de volontulaj labor-brigadoj en Třebíč.

**ÚSTÍ NAD LABEM** - Priesperanta inter-

vjuo kun d-ro V. Novobilský kaj Mir. Smyčka estis elsendata en du partoj la 22an kaj 29an de aug. en populara dimanĉa porjunulara programo "Klub" fare de radiostacio Ústí n.L. La elsendoj (entute 30 minutojn) estis kompletigitaj per du E-kanzonoj.

La direktoro de Sindikata Domo de Kulturo en Ústí n.L. aprezis la por-esperantan laboron de s-ano Jiří Kořínek okaze de lia 65-jariĝo per gratulletero kaj kolekto da gramofondiskoj.

## ESPERANTO KAJ LA PACO

La sincera klopodo por la paco ne estas nura propagando. Oni povas misuzi la pacon, por la egoismaj celoj, sed fakte ĝi estas la fundamenta kondiĉo de la homa vivo - nur ĝi povas krei favoran atmosferon ankaŭ por plua kaj sukcesa evoluo de Esperanto.

Ŝajnas al mi, ke la pozicio de la IL kaj tiu de la paco estas nuntempe la sama: ili ambaŭ estas ŝajne facile akireblaj - sed ĝis nun ili ne estas garantiitaj. La homaro nepre bezonas ilin, sed la politika klimato ne estas favora al ili. La ĝis nun regantaj nacia ŝovinismo kaj imperiismo minacas kaj la mondpacon kaj enkondukon de la IL. (J. Tomčík, el prelego en EK Praha.)

## Foliumante en PM... (1)

Tiu ĉi mallongigo eble por momento embarasigos la leganton, kvankam POŜATLASO DE LA MONDO en Esperanto certe vekos ĝeneralan atenton same kiel P I V /Plena Ilustrita Vortaro/, kies inicialoj jam ne bezonas klarigon. Se la unua libro estas verkego de la Esperanto-leksikologio, PM signifas grand-skalan sistemigon de la Esperanta geografia nomenklaturaro fare de d-ro Josef K a v k a, CSc kaj d-ro Tomáš P u m p r , Akademiano.

Kiuj estas do gvidprincipoj, laŭ kiuj la tradukintoj adaptis la originan nacilingvan tekstaron, kiu estis eldonita en pliaj 11 versioj alilingvaj? Necesas rimarkigi, ke nur pli ol triono el ĉiuj loknomoj en PM (proks. 12 000) estas esperantigita, ĉar pri la elekto de nomoj esperantigendaj respondecas sole la eldonejo de PM, kiu havas sian propran koncepton pri ellaboro kaj redaktado de la poŝatlasoj.

Surbaze de la brita versio - ĉar ĝi ne postulis esencan modifon - oni unue ellaboris liston de tradukendaj nomoj. Kie transskribo de anglalingvaj mapoj ne estis necesa laŭ la vidpunkto de Esperanta prononco, la nomo restis sen iu ŝanĝo (ekz. Nagasaki). Eble en la venontaj eldonoj oni povos pligrandigi la nombron de la nomoj asimilitaj, precipe en la landoj, kie PM pleje disvastiĝos.

Estas tre malfacile por la lingvo internacia asimili sennombrajn loknomojn; pli simple ŝajnas normigi sistemon de transskribado el ĉiu lingvo Esperanten. Diference de iu simpligita transskribado, asimilado, kiu baziĝas sur kompromiso inter skribmaniero kaj prononco, inklinas al formoj pli facile rekoneblaj, pli belsonaj kaj flekseblaj (pilzenja biero anst. biero de Plzeň), pli propraj al Esperanto. Komparu ekzemple: Ŭoŝingtn kaj Vaŝingtono (Z), Astraĥanaj kaj Astraĥano (PIV), Chung-Ching kaj Ĉongkingo (PM).

Alia problemo kuŝas en "finvokala largigo de la radiko" aplikata ekz. kiam oni celas eviti homonimecon (Akrao anst. Akro). PM ankaŭ preferas forigon de la finvokalo, ĉar granda plimulto de la loknomoj estas formita laŭ tia modelo: Afrodito, ne Afroditeo. Nur kelkokaze oni devis fari escepton; la plej sudan punkton de Azio P M devis nomi Burua Kabo, ne Bura, pro ebla konfuzo kun la sudafrikaj Buroj.

Koncerne plurvortajn originalojn P M klopodis obei la principon de MOND-MAPO (M; 1968), transprenante kunmetaĵojn senstreketajn kaj enkondukante la analogajn, ekzemple Sudkarolino. Aliokaze ŝajnis esti akceptebla sole plurvorta formo: Petropavlovsko Kamĉatka, ne "Kamĉatkopetropavlovsko" (M).

Kelkaj loknomoj devis esti esperantigitaj per lausenca traduko (Yellowstone - Flavŝtona rivero). Ankaŭ urbonomaj tradukoj lausencaj kelkokaze disvastigis; P M adaptis ekzemple Mariohaveno por Maarianhamina, Torhaveno por Thorshavn ... (kn)

Venonte: Esperantigo de latin-kaj nelatinskribaj originaloj kaj de landnomoj.

## Korespondi deziras

Josika MACUBA, 23j. fraŭlino, Akagisita 75 ĉe Nakaĵima, Sinĵuku, Tokio-162, Japanio • Stefano GELENCZÉR, 24j. Kaposvár, Kertész u. 11, Hungario. Kun ĉeĥaj knabinoj • Lajos BORBÉLY, soldato, Bu-

dapest XI, Bacskai 52. III/11 • Dorota KAMIŃSKA 49j. juristino, Kudawa-Zdroj, klub "Nefryt", Pollando • Mieczysław POROWSKI, 25j. oficisto, Opole, ul. Dambornia 133 m. 15, pri sporto, turismo, literaturo, kino, muziko, interŝanĝe b. k., p. m. kaj almetetikoetojn • Adr. v. d. Hoeven Sr. P. K. 9751 Den Haag 2078, Nederlando. Pri ĉiuj temoj • Maria SNIŤKIENE, inĝenierino, 235030, Kedainiai, P/K 59, Litovio, USSR.



## Malfermita letero de prof. Lapenna al STARTO

Estimata Redaktoro,

unue, mi gratulas pro la regula publikigado de "Starto".

En la n-ro 6, p.4, mi rimarkis formulon, kiu povus misgvidi viajn legantojn. Ili povus kompreni, ke okazas nur elekto de la prezidanto, kiu poste prezentas siajn kolegojn en la Estraro al la Kongreso. Efektive, la Estraron elektas la Komitato de UEA. Post kiam mi estis elektita kiel prezidanto, mi proponis al la Komitato liston de estraranoj por aprobo de la Komitato, kiel tio estas kutimo en tiaspecaj organizaĵoj. Farante la liston, mi prenis en konsideron ne nur la kvalifikaĵojn kaj kompetentecojn de unuopaj kandidatoj por diversaj agadbranĉoj de UEA, sed ankaŭ kiel eble plej justan geografian etendigon. En la proponita listo troviĝis 1 Anglo, 1 Franco, 1 Belgo, 1 Svedo, 1 Germano, 1 Polo kaj 1 Jugoslavo; do, aldone al mi, 7 estraranoj el 7 ŝtatoj, el kiuj du apartenis al socialismaj landoj. Dum la kunsido estis proponitaj pluraj aliaj kandidatoj por la Estraro, tiel ke la komitatanoj havis la eblecon elekti el pli granda nombro ol estas la ebla nombro de estraranoj (entute 8 kune kun la prezidanto). La rezulto estis, ke la Komitato elektis Estraron, en kiu troviĝas la personoj menciitaj en via informo, nome 6 el germanlingvaj ŝtatoj kaj 1 Polo, dum mi estas laŭ nacieco Kroato kaj laŭ ŝtataneco Brito.

Vi skribis, ke "bedaŭrinde, ke en la listo troviĝas nur 1 reprezentanto el socialismaj landoj", kio povus kredigi viajn legantojn, ke mi mem faris tiun liston. Kiel dirite, tio ne estas ĝusta. Cetere, estis abunde da tempo por viaj komitatanoj atentigi pri tiu aspekto antaŭ la voĉdono, kaj ne nun, longe post kiam la elekto okazis. En la nuna stadio oni povas nur registri la faritan decidon de la Komitato kaj observi ĝin.

Kun estimo kaj koraj salutoj,

sincere via D-ro Lapenna

ENKETO DE STARTO • ENKETO DE STARTO • ENKETO DE STARTO • ENKETO DE

La redakcio petas ĉiujn legantojn /ankaŭ eksterlandajn/ aktive partopreni en la enketo, kiu celas plialtigi la nivelon de la gazeto kaj pliintensigi la reciprokajn rilatojn. La partoprenontoj estas petataj respondi tre koncize jenajn demandojn /ĝis la 10-a de januaro 1972/ :

- 1/ Ĉu la enhavo kaj aspekto de STARTO kontentigas vin ?
- 2/ Ĉu vi legas la gazeton komplete aŭ nur parte ?
- 3/ Kiu artikolo/numero/ plaĉis al vi plej multe ?
- 4/ Pri kio vi ŝatus legi venonte ? Kion preferi aŭ eviti ?
- 5/ Ĉu vi dezirus, ke la tuta numero estu skribita ekskluzive en Esperanto ?
- 6/ Ĉu vi jam kontribuis al la gazeto ?
- 7/ Kiun alian nomon vi proponus por STARTO ? Ĉu vi aprobas la ĝisnunan ?

ENKETO DE STARTO • ENKETO DE STARTO • ENKETO DE STARTO • ENKETO

## Tiuj plej eminentaj

Al d-ro T.Pumpr

Tiuj plej eminentaj  
antaŭen sin ne puŝas,  
sur ili ĉiam kuŝas  
taskoj temprabaj, gravaj.  
Ho, tiuj vere bravaj,  
ho brava vi !

Tiuj plej eminentaj  
silentas pri l'diplomoj,  
ja ili kiel homoj  
al ni jam iĝis karaj.  
Ho, tiuj vere raraj,  
ho, rara, vi !

Tiuj plej eminentaj  
neniam false pozas,  
sed sian sulkon fosas  
por ni kaj eksterlandaj.  
Ho, tiuj vere grandaj,  
ho, granda vi !

Eli Urbanová /1954/

/Inspirita de la apero de  
"Bapto de caro Vladimiro"  
enperfekta traduko de T.P./

**K**oncizan biografion de nia elstara poeto Jiří KORIŔNEK (kiu antaŭnelonge 65-jariĝis) rakontatan de li mem enhavas sonbendo kreita de d-ro V.Novobilský kaj prezentita la 21an kaj la 28an de sept.en la praga EK. (La dua parto entenas elektitajn poeziaĵojn, originalajn kaj tradukitajn). La tuta sonbendo povus (kaj devus !) fariĝi modelo kiel pretigi similajn programojn pri niaj vivantaj emeritoj. Ni imagu, kian edukon kaj historian valoron havus similaj sonbendoj - se ili ekzistus - pri niaj pioniroj, kiuj ne plu vivas - ekz. Hromada, Kamarýt, Šupichová, Šustr k.a. La menciita sonbendo estas modela, pro la perfekta lingvo, belsonaj voĉoj, preciza prononcado, konciza teksto kaj senriproĉa teknika flanko.

Estus rekomendinde aldoni al ĉiu simila sonbendo ĝian multobligitan tekston, kiu povus esti vendata en la respektiva rondeto aŭ klubo antaŭ la prezentado. En la rondetoj, kie estas multe da komencantoj, oni povus prezenti el la 2a parto nur pli-malpli longan elekton, ĉar nia meznivela samideano ne kutimas legi poezion kaj sekve je tiom malpli povas ĝin kompreni laŭ deklamo. (Fx)

**N o t o d e l a r e d a k c i o :** La teknikisto de EK en Ústí n.L. kopies la magnetofonan programon sur alsenditan bendon por 20 Kčs. La aferon peras d-ro V.Novobilský, Školní 5, Ústí n.L.

**KOREKTO.** En la pasintan numeron de STARTO, sur 8.p. (Verda agentejo raportas) enŝovigis preseraro ; anstataŭ "en la venonta januaro" devas esti j a r o .

**BAPTO , KIU TIMIGIS CENZURON**

La 12an de okt.lige kun sia 65-jara vivojubileo (2.10), partoprenis la programon de EK Praha d-ro T.Pumpr, rakontante pri sia traduklaboro super la "Bapto de caro Vladimiro" de la granda ĉeĥa ĵurnalisto Karel Havlíček Borovský, de kies naskiĝo pasis la 31an de oktobro 150 jaroj.

Jam antaŭ la j.1939 T.Pumpr provetis esperantigi tiun ĉi faman verkon. Konata E-literaturisto R.Rossetti, kiu post la milito vizitis Pragon, traleginte nefinitan E-version, instigis R.Pérez eldoni ĝin en STAFETO tuj post la kompletigo. La Esperanta BAPTO naskiĝis 6.9.1952, en la sama tago, kiam disigis la Esperanto-organizaĵo en ĈSR.

La sekvontan jaron la libro ekpaŝis sian dornoplenan vojon similan al tiu de la originalon farinta majstro. Tamen ne al Brikseno (Bressanone), kien antaŭ jarcento estis eskortita la ekzilito Havlíček, sed el Hispanio, kie la cenzuro deziris deziris detruĝi la tutan eldonkvanton, ĉar la enhavo de la "Bapto" estas evidente kontraŭreligia kaj kontraŭabsolutisma. La persekutataj libroj devis trovi siajn legantojn en la mondo nur post komplika ĉirkaŭvojo tra Nederlando. (knl)

Komitata kunveno de la sekcio okazis en Vsetín la 26an de septembro. Kiel gastoj ĉeestis vicprezidanto de ĈEA ing. Sviták, sekr. de ĈEA P. Polnický kaj s-ano Stuppniĝ el Austrio. La komitato pritraktis la proponon de la nova organiza statuto de la sekcio kaj transdonis skribe siajn amendojn al la Asocio. Plue ĝi pritraktis raportojn de la ĉeestantaj funkciuloj kaj preparis en ĝeneralaj trajtoj la sekvantan komitatatan kunvenon, kiu okazos 4.-5.12.1971 en Prago, en kultura ĉambro de la stacidomo Smíchov. Provizora programo :



## SIGNALILO

FERVOJISTA  
SEKCIO  
DE ĈEA

**s a b a t o :** 10,00 h. - Kunveno de la komitato (publika)  
13,30 - Komuna trarigardo de Prago  
20,00 - Interkona vespero

**d i m a n ĉ o :** 9,30 - Plenkunsido (salutoj de eksterlandaj gastoj, raportoj de la funkciuloj, komitataj elektoj)

Partopreni la kunvenon promesis ankaŭ reprezentantoj de la fervojistaj sekcioj el najbaraj landoj.

Plensukcesan propagandan ekspozicion realigis ER AMIKECO en Ĉ. Třebová. La gepartoprenantoj konatigis ne nur kun la laboro de la rondeto, sed ankaŭ kun la agado de la Fervojista Sekcio de ĈEA. Elstaran lokon en la ekspozicio okupis dokumentoj pri laborista movado esperantista. Dek stereodisketoj kaj 1136 bildkartoj montris belecon de la tuta mondo. En la centra parto estis ekspoziciitaj fervojoj diverslandaj fare de s-ano Fiala el Poděbrady. Ĉiuvespere oni projekciis diapozitivojn pri alilando.

- Ladislav Lá n i, junulara gvidanto de la sekcio, rezignis. Provizore lin anstataŭos vicprezidanto de la FS František J i n d r a.

- Terminara komisiono de la sekcio sub la gvido de ing. Řebíček plenumis jam duonon de sia tasko ĉe la kompilado de la ĉeĥa-Esperanta fervojista fakvortaro.

- Ekskurson al Pollando preparas la respektiva komisiono de FS. Interesatoj, turnu vin al ties gvidanto : Josef S v o b o d a, Konst. Biebla 2313/44, Most.

- La 15an de decembro estas limdato por akcepto de viaj abonpagoj por INTERNACIA FERVOJISTO 1972. La prezo por 6 numeroj restas 25 Kčs. Viajn mendojn direktu al Jiří P i š t o r a, Nám. míru 1746, Ĉ. Třebová.

- ER "Amikeco" en Ĉ. Třebová ĝemeliĝis kun la esperantistoj en Kŭocko ( PPR). La membroj de ambaŭ rondetoj jam nun ĝojas je la unua komuna renkontiĝo planata por februaro 1972 okaze de la tradicia Esperanto-balo en Ĉ. Třebová.

- La 13a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno (IFES) okazos inter la 5a kaj 12a de februaro 1972 en la fervojista sportodomo "Willi Merkl-Heim" en Spizigsee. La loko situas en la bavaraj Alpoj. Bv. peti informojn kaj aliĝojn kontraŭ respondkupono ĉe s-ino Elfriede Kruse, D 6 Frankfurt a/Main, Schweizer Str. 104, FRG.

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio - vydává Český esperantský svaz, p.schr. 8, Praha 2. Aperas dufoje kvaronjare - vychází dvakrát čtvrtletně. Respondeca redaktoro - odpovědný redaktor Oldřich K n í ch a l. Redakta komitato - redakční rada: ing. Eduard Felix, Jaroslav Mařík, ing. František Sviták. Dohlédací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen RP Praha j.zn.P/1 - 2283/1971 dne 6.5.1971.

## Rilato de la junularo al Esperanto ĉe ni

Pro la konstanta evoluo de internaciaj kulturaj, sciencaj, politikaj kaj komercaj kontaktoj, pro la potenca kresko de turisme kaj pro la konsiderinda mallongigo de interkontinentaj distancoj dank'al la ŝtorma teknika progreso, la homa interkompreniĝo fariĝas ĉiam pli necesa, ĉiam pli urĝa. Tial oni akcentas la bezonon de studado de fremdaj lingvoj. La juna generacio, kaj en nia lando kaj en la ceteraj landoj sentas la neceson de interkompreniĝo pli urĝe ol tiu de pliaĝuloj, ĉar ĝi vivos pli grandan parton de sia vivo en novaj, ŝanĝiĝintaj kondiĉoj, kiuj de ĉiu inteligenta homo postulos scion de almenaŭ du mondlingvoj. La vivoplena junularo kompreneble deziras sukcese fronti la postulojn de sia epoko kaj tial ĝi devas studi fremdajn lingvojn same intense kiel teknikajn, natursciencajn kaj humanitarajn fakojn.

Neniu junulo estas spertoriĉa. Antaŭ ol elekti iun fremdan lingvon por ekstudigi ĝin, kutime serĉas konsilon ĉe la plenkreskuloj kaj nur post la detala informiĝo kaj post pli malpli longa konsiderado li faras la decidan paŝon. Kaj ĝuste la konsiloj kaj opinio de la pli aĝa generacio pri la lingvoproblemo influas la decidojn de la gejunuloj kaj formas ilian rilaton al fremdaj lingvoj inkluzive Esperanton. El tio rezultas, ke la opinio de la junularo pri Esperanto estas grandparte transprenita de la plenkreskuloj.

Vere malfacile estas paroli pri ia ĝenerala opinio de junularo pri Esperanto, aŭ pri ia ĝenerala rilato de junularo al Esperanto, ĉar la opinioj de unuopaj gejunuloj pri la lingvo internacia estas tre variaj, tiom variaj, ke, se mi dirus "la opinio estas favora", mi ne esprimus veran staton, kaj se mi dirus "la opinio estas malfavora", mi farus la saman eraron. El vidpunkto de la rilato de nia junularo al Esperanto mi devas dividi la gejunulojn en du grupojn, el kiuj la dua estos bedaŭrinde pli multnombra. Intence mi ne uzos dividon je esperantista kaj neesperantista junularoj, sed dividon je junularo bone informita pri Esperanto kaj junularo mise aŭ tute ne informita pri ĝi.

Al la unua grupo apartenas krom esperantistoj ankaŭ gejunuloj bone kaj precize informitaj pri la misio de la lingvo internacia kaj tial simpatiantaj kun ĝi, sed pro diversaj kaŭzoj ankoraŭ ne enviciĝintaj en nian mezon. La dua, pli granda grupo estas la rezulto aŭ de misinformiteco aŭ de totala neinformiteco pri Esperanto, kio verŝajne atestas pri la malforta efiko de propagandrimedoj uzataj de esperantistoj.

Ju pli bona kaj fervora estos nia apostelado precipe jam en la fundamentaj lernejoj, des pli malgranda iĝos la dua grupo kaj tio ja estas nia celo! Estas ankoraŭ multaj, kiuj supozas, ke Esperanto estas artefarita kaj tial malfacila lingvo, kiu servas nur al malgranda grupo da hobiuloj. Kutime oni vidas ĉion artefaritan tro komplika, kaj pro la natura komfortemo ne ŝatas esplori la problemon pli detale por ekscii veron; oni simple kontentigigas pri supra, misa taksado de la aferoj. Nemalofte oni ankaŭ prijuĝas nian movadon laŭ la konduto de kelkaj esperantistoj-fanatikuloj, kies troa fervorado damaĝas nian aferon.

Ni ekkonsciu, ke la inteligenta junularo malsatas je scio, sopiras pri justeco, serĉas ian celon, volas iamaniere plenumi sian liberan tempon, da kiu ĝi havas sufiĉe. Ni ekiru renkonten al tiuj ĉi postuloj de la gejunuloj, ni turnu nian atenton pli konsekvence al ili, ni montru al ili taŭgan celon kaj gajnu ilin por nia afero! Manon sur la koron, gesamideanoj, kiom da lernavidaĵoj kaj talentaj junuloj forlasis nin nur pro tio, ke en niaj kluboj estas malfavora etoso por la juna generacio, ke oni ne respektas ties interesojn kaj tiel ĉi subpremas en la koroj de la junaj homoj inklinton por Esperanto.

Pli larĝe ni malfermu la pordegon en Esperantujo, ĉar nia movado bezonas junularon tiom urĝe, kiom nia junularo bezonas Esperanton!

(Premita en la oratora konkurso ĉe la Renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj en Vsetín.)